

Rizo kun verda legomo (Vary amin'anana)

Estas 25 studentoj en la 12a klaso. Ili preskaŭ finis la duan trimestron de la lernojaro. Ili estas iom ekscititaj atendente la ekzamenperiodon.

- "Soa, Kial vi neniam parolas? *Tu vois, tout le monde parle*", diris iu knabo, samklasano de Soa. Hanta, iu samklasano, intervenis kaj strange ridis primokante ŝin: "Sensenca demando, ŝi ne scias paroli la francan, ŝi mastras preskaŭ nenion, tial ŝi ne kuraĝas paroli, ha ha ha". Multaj aliaj gelernantoj kiuj iele fremdlandaniĝis mokridis al Soa "*C'est pourquoi elle ne parle jamais, ŝi timis embarasi sin*". "Tial ŝi neniam parolas la francan sed ĉiam nur la simplaĉan malagasan, ĉu ne?", aldonis la aliaj por fortigi la atakon al Soa. Ili ĉiam tiel kondutas al Soa kiam ili ne aŭdis Soa uzi la francan lingvon aŭ francajn vortojn kiam ili babilas.

Kiam la ekzamenperiodo de la dua trimestro alvenis, ankaŭ la malagasa lingvo estis parto de la ekzameno. Sed ĉi foje, la ekzameno estis vere speciala, ĉar ĉiuj studentoj devis prepari la malagasan ekzamenon hejme kaj prezenti ĝin publike en la klaso. Soa estis tre kontenta prepari ĝin, ĉar la Malagasa estas unu el ŝiaj tre ŝatataj studobjektoj. La demando provis valorigi la malagasan lingvon: "la miksita lingvo, ĉiutagaĵo de nuntempaj junuloj, kia/kiel estas ĝia limo?". Dume, ŝiaj samklasanoj iom embarasiĝis ĉar ili ofte uzas miksitan lingvon. Ŝajnas, ke la demandoj jam kulpigis ilin kaj ili hezitas eĉ skribi respondojn.

La prezentotago alvenis. Unu el la reguloj estis paroli nur la malagasan lingvon dum la publika prezentado. Tiuj, kiuj vantigis ies lingvon, sinsekve prezentis. Kelkaj apogis ke "estas bone uzi miksitan lingvon" ĉar ĝi helpas al bona klarigado. Aliaj diras ke la malagasa lingvo ne havas rimedojn por traduki kelkajn vortojn. "Por ke oni ne tro rekte esprimos ion" aldonis iuj. "Signo de disvolviĝantaj homoj" asertas la aliaj. Ili tre malfacile klarigis ilian vidpunkton en la malagasa kaj ilia uzo de francaj vortoj kiel "*donc, ainsi, alors, par consequant, c'est pourquoi, je veux dire...*" ankoraŭ malbone sonis al la oreloj, ĉar ili ankoraŭ servis miksitan lingvon al la aŭskultantoj.

La esprimo/prezentado de Soa estas unika kaj senegala, kiam ŝia vico alvenis. Ŝi montris, ke miksita lingvo vere estas kiel rizo kun verda legomo, ĝi faciligas la taskon. Oni ne bezonas multe da tempo serĉi krompladon. Oni ne bezonas tempon prepari la krompladon, simpla kaj facila kiel rizo kun verda legomo. Sed oni ne povas ĝui nek distingi la guston de la rizo kaj la legomo aparte. Tia estas la "miksita lingvo". Ŝi daŭrigis per sia perfekta mastrado de la malagasa lingvo, kiam babilante, ni miksas la lokan lingvon kun la kolonia. Unuflanke ŝajnas facile uzebla, ne bezonas cerbumi, serĉi propran vorton; oni eĉ konsideras ĝian uzadon kiel modon kaj signon de disvolviĝo, sed ne estas tia kiam oni bone observas/pensas. Tiuj kiuj ĝenerale uzas miksitan lingvon, malfacile esprimas sin en nur la malagasan aŭ la francan. Soa martelis, ke multaj junuloj ne bone regas nek sian patrinan lingvon nek la kolonian, kiun ili vante pensas kiel signo de disvolviĝo. Aliflanke, ili konsideras la malagasan kiel senvaloran lingvon, kiu ne havas sufiĉan vortotrezoron esprimi ion, kaj ies opinio ne estas sufiĉe klara se oni uzas ĝin sen aliaj fremdaj vortoj. La malagasa lingvo havas multajn diversajn vortojn, kiuj estas sufiĉaj por esprimi ian ajn ideon/opinion. Eĉ estas vortoj, kiuj ekzistas nur en la malagasa lingvo kaj ne eblas traduki ilin en fremdajn lingvojn kiel: fihavanana, valintanana, firaisankina, fatidra kaj multaj aliaj. Tial, la uzo de

miksita lingvo havas limon. Oni ne rajtas uzi ĝin dum ekzameno, aŭ dum intervjuo por iu laboro en iu kompanio. Oni tiam petas la kandidaton uzi unu lingvon, la patrinan aŭ la francan.

“Mi amas mian lingvon” diris Soa, “kaj mi valoras kaj uzas ĝin ĉar ĝi havas multajn riĉesprimajn vortojn. Tio ne signifas ke mi ne bezonas fremdajn lingvojn...”

Tial mi ŝatas uzi mian patrinan lingvon ĉiufoje mi babilas. Kiel iu famulo diris: “Mi valoras mian lingvon kaj mi provas mastri tiun de alia”. Dum ŝia prezentado, ŝi ne uzis eĉ unu fremdlingvan vorton. Aŭskultantoj dankeme respondis ŝian prezentadon per laŭta aplaŭdo.

Kiam la rezulto estis publikigita, Soa estis tre kontenta ĉar ŝi ricevis la plej altan gradon en la malagasa ekzameno. “Eĉ kiam la rizo kun legomo estas bongusta, ĝi estas limigita”, ridetas Soa legante la raportokarton. Ekde tiam, la valoro de Soa altiĝis ĉar ŝi ĉiam estis inter la gajnintoj kiam ŝi partoprenis ian konkurson.

Verkita de RANDRIANOHERY SEDRAMPITIA Nisi

Tradukita de RAFANOMEZANTSOA Falimanana